



ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX/14, p. schr. 75. — Redaktas Dr Stan. Kamarýt.

Morto de Dr Edvard Beneš, la 3-an de septembro 1948, signifas por ni ne sole forpason de batalinto por demokratio kaj por sendependeco de nia nacio, sed ankaŭ forpason de amiko sincera de nia klopodado por enkonduko de helpa lingvo internacia. Lastan fojon li tion vidigis per saluto al la Berna kongreso kaj en letero el 26-a de januaro 1948, kie lia kabineto konfirmis ricevon de niaj memorando kaj letero kaj diris, ke sinjoro prezidento »tralegis ilin kun tiu intereso, kian li ĉiam havas pri via laboro kaj ĝiaj rezultoj«. Forpasis homo ekster iu ajn serio, kiu sincere konsentis ankaŭ kun nia celado. Ni enskribu tie ĉi, kion li estas dirinta antaŭ ĉeĥoslovaka Stata Konsilantaro en Londono la 23-an de Februaro 1945: »Kaj mi konstatas tuj en enkonduko de mia konkluda parolado en eksterlando, ke ĉiuj miaj deziroj estis kaj estas plenumitaj: Depost jaro 1922 mi estis en senkompromisa batalo kun faŝismo kaj poste kun naziismo; neniam mi faris al unua nek al la dua ian principan koncedon, neniam mi akordigis kun ili. Dum bataladoj pri Munĥeno mi kiel unua funkciulo de la Respubliko malvenkis komune kun vi kaj kun nia tuta ŝtato; sed eĉ tiam mi ne cedis kaj mi neniam estus cedinta. Pluan lukton ni nun komplete gajnis, hodiaŭ kuŝas ambaŭ niaj kontraŭuloj sur tero kaj kalkuloj kun ili estos teruraj. Mi deziras jam nur unusolan aferon: ke nia ŝtato el ruinoj, restintaj ĉe ni kaj en Eŭropo post la naziista falo, plej rapide revivigu por libera vivo kaj komplete resaniĝu. Kaj poste mi jam havas neniujn dezirojn por la vivo.«

Moje vzpomínky na Masaryka

Se jménem Masarykovým setkal jsem se po prvé za svých studií na učitelském ústavu v Příboře. Bylo to asi roku 1896 neb 1897, kdy čtyřčlenný kroužek studentů ze 3. ročníku začal odebírat a horlivě číst Herbenův »Čas« a za krátko na to i Masarykovu »Naši dobu«. Když jsme byli ve 4. ročníku, nakladatel Jan Laichter jal se vydávat po sešitech Masarykovu »Sociální otázku«. Tři z nás začali jsme ji odebírat a ovšem i studovat. Nežli bylo toto Masarykovo dílo vydáno, byli jsme už každý na svém prvním učitelském místě: já v Bystřici p. Host., Bilík ve Znorovách na jižní Moravě a Holub ve Veřovicích u Frenštátu p. R. Teď jsme už odebírali »Čas« a »Naši dobu« každý pro sebe a Masaryk stával se nám čím dále tím dražším, protože jsme jeho snahám dobře rozuměli a chápali je. Po prvé jsem Masaryka viděl a slyšel, když přednášel moravskému učitelstvu na universitních extensích v Hranicích, kam dojížděl ze svého letního sídla »Na žabárně« u Valašského Meziříčí. Jezdíval do Hranic na kole. Představte si, jak musil býti Masaryk otužilý, když skoro denně vykonal takovou turu tam a

zpět a při tom ještě přednášel, aniž byl zřejmě unaven. Obě cesty měřily přes 60 km.

Druhé, ale jen letmé setkání s Masarykem a jeho rodinou bylo ve vlaku, kdy oni se vraceli z výletu na Radhošť a já se svými kamarády Hořeckým, Zapletalem a Bačůvkou ze zájezdu do Příbora a na Hukvaldy. Seděli jsme naproti paní Masarykové — aniž bychom to byli věděli. Teprve až před stanicí Krasnem přišel z jiného oddělení profesor Masaryk, poznal jsem, s kým jsme to jeli.

Třetí shledání bylo už jiného rázu, snad mohu říci — politického. Před Masarykovou kandidaturou na Valašsku svolal Dr Kraicz, lékař ve Val. Meziříčí, do svého domu poradní schůzi, do níž byli z Bystřice pozváni: kol. Krumpholz, odborní učitelé Šídlo a Mlýnek, Heřman Přikryl a také já. Byl jsem tenkrát pro politiku ještě příliš mlád a nevím tudíž dodnes, proč se mi té cti dostalo. Při schůzi byl přítomen Masaryk a sledoval bedlivě situační zprávy jednotlivých účastníků schůze. Mnoho nemluvil, ale bylo patrné, že mu neušlo ani slovo.

Čtvrté setkání s Masarykem bylo už v Bystřici. Bylo to před říšskými volbami v březnu roku 1907. Setkání toto bylo nejintimnější, protože Masaryk byl hostem u prozatímního učitele — to byl tehdejší můj úřední titul — který mu propůjčil svůj skromný pokojík v domě č. 462 v Nádražní třídě. A byl tam hostem po třikrát. Proč byl ubytován tak skromně a ne v prostředí blahobytnějším? Příčinou toho byly tehdejší politické rozhárané poměry, o jakých dnešek nemá ani zdání. Masaryk byl pro tehdejší bystřickou společnost a zejména pro vládnoucí kruhy, tisíci se u stolu v oddělené místnosti u Vaverků (vinárnička, do které často chodíval i Hanuš Schwaiger, jenž však s touto společností sedával málokdy), čímsi strašidelným a bylo tehdy u nás dost lidí, kteří byli příliš opatrní a nechtěli popudit proti sobě zmíněné vládců našeho městečka. Ti pohostinství nenabídli. Zbyl tedy prozatímní podučitel, který už i dříve poskytoval útulek a pohostinství různým »petrolejníkům«. Byli to na př. z našich známých lidí Karel Pelant a Edmund Burian, oba redaktori dělnického časopisu »Rovnost«, tehdy moravského orgánu strany sociálně demokratické a dva esperantisté — ruští revolucionáři-anarchisté, z nichž Seleznjov byl z evropského Ruska a Evstifejev až z Mandžuska. Pro zajímavost dodávám, že Seleznjov byl původně dělníkem u dráhy, ale neobyčejně inteligentní, spisovatel a básník, botanik a filolog, jenž cestoval za jistým účelem po střední a západní Evropě. Seleznjov zemřel později v Paříži. Evstifejev byl ředitelem carských zlatých dolů v Urze a financoval cesty Seleznjovovy. Evstifejev stal se po ruské revoluci členem komisariátu osvěty a školství v Moskvě. A kromě osob tehdejších rakouským úřadům nepohodlných, bývali v »Masarykově pokojíku« vítanými hosty také naše vynikající osobnosti, z nichž jmenuji universitní profesory Bláhu, Tvrdého a Uhra. Oba poslední zahynuli ve spárech gestapa... Řada hostů dala by se ještě rozšířit o návštěvníky-esperantisty z Anglie, Belgie, Dánska, Švédska a Maďarska.

Tehdejší c. k. okresní hejtman Dr Hložek mne sice neměl v lásce a nemohu to říci ani o bývalém starostovi města, ale budiž jim vzdána chvála za to, že mne nechávali oba na pokoji, ač si dali o mně svými orgány leccos zjistit. Poznám jsem to nejlépe při týdenním pobytu Seleznjova. Hledal jej u mne z rozkazu hejtmana nebo starosty šéf městské policie, ale hledaný na štěstí též den ráno odejel.

Vraťme se však zase k Masarykovi. Podrobnější zprávu o jeho pobytu u mne nepodávám, protože je o tom pověděno jinde.*) Já sám jsem neměl dosti příležitosti k delším rozhovorům s Masarykem, protože ze schůzí přicházel pozdě a unaven a ráno brzo odjížděl. Ale lituji, že nemáme dnes pamětníků nebo písemných zpráv o jeho stycích se zdejšími dělnickými kruhy. Po schůzích nebo přednáškách rád si promluvil ne-

*) St. Jandík, Masaryk na Valašsku, 1936, vydala Volná myšlenka, str. 177.

bo podebatoval s předáky dělnického hnutí. Tak na př. u nás to byli Simerský, Hlybner, Zapletal a j., kteří by mohli říci mnoho zajímavého. Bohužel jsou už všichni mrtví a ti nemluví. Také je škoda, že reportér Jandík ve své knize »Masaryk na Valašsku« neměl dosti času, aby zachytil také zprávy z tohoto prostředí. Totéž platí i o ženách, mezi nimiž byly velmi horlivé a oddané pracovnice v době volební. Vzpomínám tu zejména učitelky Janalíkové a Hlobilové-Šidlové.

Moje páté a poslední setkání s Masarykem bylo při jeho návštěvě v Bystřici p. Hostýnem — tehdy už jako prezident republiky. Bývaly to pravidelně návštěvy oficiální, ale i při těch našel si Masaryk vždy několik chviliek, aby mohl promluvit se svými starými známými nebo spolupracovníky. Bývalo to až ke konci návštěvy, kdy přistoupil ke známým, stojícím na jeho přání ve zvláštní řadě, podíval se bystře do očí, podal ruku a už se na něco tázal. Jeho otázka ke mně zněla: »Vydáváte eště ty esperantské časopisy?« Odpověděl jsem, že dnes jsou na to u nás už mladší lidé. Časopisy, jichž se otázka týkala, byly: Revuo Internacia, Český Esperantista a Internacia Pedagogia Revuo. Ty totiž vycházely v Bystřici p. Host. mým nákladem i redakcí.

Pro zajímavost tu připomínám, že Masaryk měl vždy kladný poměr k ideji pomocného jazyka mezinárodního (jako i náš Komenský a Dr Beneš) a tedy i k esperantu. Lze to soudit z toho, že v jednom ročníku »Naší doby« uveřejnil delší zprávu esperantu příznivou, což nikdy ne učinil, jestliže s něčím nesouhlasil.

Z jeho dotazu o esperantských časopisech jsem také poznal, jak úžasnou paměť Masaryk měl, když po tolika letech tak úmorné práce v době, kdy se hýbalo víc než půl světa a v níž právě on hrál tak důležitou roli, pamatuje si, co se dělo kdesi v malém městečku, a to ještě na poli jeho práci tak odlehlém.

Genius projeví se vždy a všude!

14. II. 1947.

Th. R. Čejka.

Laborkunsido de la VII-a regiono en Teplice okazos la 2—3-an de oktobro. Interesatoj mendu tuj invitilon de la sekretario s-ro A. Košťál, Teplice II-Trnovany, Vlastní krb 1070.

Zajímáte se o hodnotné propagační přednášky Josefa Vítka, které jistě posílí vaše místní hnutí?

Vyberte si:

Švédsko — moje druhá vlast.
Polární Laponsko.
Dánsko po poslední válce.
Norsko, země fjordů a ság.

Všechny přednášky doprovázeny světelnými obrazy nebo filmem. Podrobnosti sdělí Josef Vitek, ministerstvo školství, odb. A VI/6, Praha III, Valdštýnský palác. — Přiložte frankovanou obálku.

KRONIKO ENLANDA

Dr Aug. Pitlík sesdekkvin-jara. Li naskiĝis la 24-an de julio 1883 en Bavorov. Tiu ĉi esperantisto el la pionira epoko (depost jaro 1902) estas daŭre aktiva laboranto. Tial li estas tiom konata inter samideanaro, ke ne decas ripeti faktojn konatajn. Ni provis doni skizon de lia aktiveco en Bulteno, kiam li estis kvindekjarulo. Ni aldonu al tio, ke nunjare estas 25 jaroj depost lia unua radioparolado, ke estas pli ol kvaronjarcento depost kiam li estis ĝenerala sekretario de la Universala Kongreso en Praha, ke dum tiuj jaroj li vizitis preskaŭ ĉiujn kongresojn, plej ofte kiel reprezentanto de ministerioj, ke li feliĉe revenis el sia Ameriko-vojaĝo kaj faris pri ĝi multajn tre agrable aŭskultatajn paroladojn, ke li sukcesis post la milito restarigi Esperanto-lektoraton en la Altlernejo por specialaj sciencoj, ke li antaŭ du jaroj prenis funkcion de direktoro de la Somera Esperanto-Lernejo en Doksy, kie li plenumas laboron tre utilan kaj tre prosperan kunigante aron de sindediĉaj kunlaborantoj. Tre volonte li deklaras devizon: »Esperanto junigas«. Multaj kredas, ke li mem estas pruvo de tiu ĉi aserto. Estas nun aŭdataj kaj legataj versaĵoj de li verkataj ĉeĥe, ofte tradukitaj de amikoj en Esperanton. Tiu fakto mem estas pruvo de lia juneco. Do estu li mem longe vivanta pruvo de sia teorio pri junigaj efikoj de Esperanto-profesio!

Regiona kunveno en Hradec Králové. La 19-an de Marto okazis la tradicia amuza Jozeffesto, kiun partoprenis gastoj el Praha, Přelouč, Turnov, Jablonec, Tanvald, Čes. Skalce, Chomutov, Svítavy, Olomouc, Brno kaj tuta aŭtoĉaro el Josefov-Jaroměř. Por multaj el ili la Klubo pri zorgis senpagan loĝejon. Programo unuagrada, danco ĝis la tria matene. La 20-an de Marto prez. de EK Josef Vitek malfermis la laborkonferencon. Dro Pitlík el Praha prelegis pri la evoluo de E. dum la pasintaj 60 jaroj informante detale pri neologismoj, idiotismoj, arkaismoj, pri elparolado ktp. Prez. Vitek parolis pri la granda laboro de nia Asocio kaj alvokis ĉiujn, ankaŭ izolulojn, plene ĝin subteni. Siavice E. K. Hradec krom 70 membroj en Hradec Králové varbis en aliaj lokoj pluajn 47 membrojn por Asocio, 19 el ĝiaj membroj estas membroj de UEA, 3 abonas Literaturan Mondon kaj 11 Heroldon de E. — Fr. Pytloun parolas pri laboro de la klubo, eldono de Poŝkalendaro, filio de Asocia Libroservo kaj informas, ke post la milito restis en Hradec 4—5 membroj, dume nun la EK estas la dua plej forta klubo. La dua pro tio, ke ni vokas la klubon de Brno al konkurso. Sekvis grava diskuto pri kursoj, instruistoj. Partoprenis dro Pitlík, Vitek, Dolanský. Oni akceptis poste la proponojn: Asocio eldonu adresaron de kluboj (en la gazeto aŭ ciklostile). En niaj gazetoj oni ne debatu multe pri occidental kaj ne faru tiel reklamon por ĝi. Informiloj, gvidlibroj estu normigitaj. Oni kunlaboru kun Klubo de ĉ. turistoj. Oni uzu titolon samideano anstataŭ sinjoro. Por plivigliĝi la kluban vivon oni eldonu esp. tradukon de popolkantoj. Ĉiu samideano klopodu fariĝi perfekta esperantisto. Fr. Pytloun parolis poste pri la venonta laboro, pri kursoj en ĉiuj najbaraj urboj, skriba kurso eldonita de EK, prelegoj, ekskurso al Ĉeĥa Paradizo, al Kunětická Hora kaj vojaĝo al Hungario. Resumante ĉion prez. Vitek akcentis, ke la kluba estraro volas servi al la membraro kaj helpi ĉiujn. La laborkonferenco finiĝis je la 13a horo per fotografado antaŭ la nove instalita tabulo „Strato de Zamenhof“. (Py)

Internacia radioekspozicio en Praha (MEVRO). La ĉeĥoslovaka radio festis dudekkvin jarojn de sia ekzisto per internacia radioekspozicio de la 17-a de junio ĝis la 11-a de julio 1948 en Praha. La ekspozicio, aranĝita grand-

skale en dek pavilonoj sur la Nova ekspoziciejo apud la foira palaco, ebligis al la vizitantoj supervidon pri la historia evoluo de tiu ĉi moderna komunikilo kaj pri la nuna stato de la radiofonio. La ekspozicio allogis 300 mil vizitantojn, kiuj krom la radiovido (kies ĉiuj aparatoj estas produktoj de la ĉeĥoslovaka industrio) kaj aliaj interesaĵoj sekvis avide specialajn elsendojn de la radioekspozicia sendilo MEVRO, prezentatajn antaŭ la okuloj de la publiko en granda studio. Tiu ĉi 4½ KV-a stacio havis duonmilionon da fidelaj aŭskultantoj, al kiuj plaĉis plej multe la senpera prezento de la programoj, kiujn la vizitantoj kaj aŭskultantoj mem estis kreantaj en la elsenda studio. La aranĝantoj mem estis tre surprizitaj pro la neatendata intereso de la publiko. Ankaŭ eksterlandaj ĵurnalistoj kaj verkistoj miregis, kiam ili povis paroli en la mikrofonon kion ajn laŭ sia plaĉo, sen devo antaŭanoni, pri kio ili volas paroli. Samtempe kun la dudekkvinjara jubileo de la ĉs. radio venas dudekkvinjara jubileo de Esperanto en la ĉs. radio. La sekcio de mallongondaj elsendoj en la ekspozicio estis markita per 18 flagoj de la landoj, en kies lingvoj nia Radio parolas. La flagoj estis bele pentritaj sur vitro en du vertikalaj vicoj; la supra flago en la dua vico estis la verda kun la kvinpinta stelo. Ekspoziciataj korespondadoj, fotografiaĵoj kaj t. n. „velo“ (papero kun presitaj teknikaj indikoj de elsendado) atentigis pri la Esperanto-elsendoj. La Esperanta estis la unusola el la fremdlingvaj dissendoj, kiu atentigis tiamaniere pri si. En alia fakto ni vidis fotografe pligrandigitan poŝtkarton, kiu venis al la redakcio de la Esperanto-servo, kun terĝlobo, stelo kaj pola surskribo, kiun ĉiu enlanda vizitanto komprenis: Internacia lingvo Esperanto. Inter ekspoziciataj libroj, koncernantaj la radiofonion, estis lokita la antaŭmilita „Almanako de la Verda stacio“. La radiofonioj pola kaj hungara havis memstarajn pavilonojn en la ekspozicio. Esperanta stelo kaj ĉeĥa surskribo anoncis en la hungara pavilono, ke ilia radio elsendas en Esperanto. La sendilo MEVRO parolis dufoje — kiel ni scias — pri Esperanto. Ĝi dankis al la ĉeĥoslovakaj esperantistoj pro „efika propagando de MEVRO en la eksterlando“ per artikolo en Heroldo de Esperanto (verkita de la subskribinto) kaj alifoje ili menciis la Esperanto-elsendojn de Praha laŭ telefonpeto de aŭskultanto Lorenc. La ĉs. radio eldonis ĉeĥan broŝuron „25 jaroj de la ĉs. radiofonio“, sur kies 5. pĝ. ni legas: „... sed ankaŭ ĉe ni montriĝis, ke estas eble kaj necese uzi la radion por propagando; ekz. la laboron de la Verda stacio depost la jaro 1933 — la unuan Esperanto-programon de la mondo.“ La improvizataj programoj de la sendilo MEVRO kun aktiva partopreno de la aŭskultantoj havis tian sukceson, ke oni urĝe rekomendas daŭre konservi tiun ĉi novaĵon. Ni travivas, ke ree unu el la profetaĵoj de Jan Amos Komenský plenumiĝis. Li profetis en la 17-a jarcento: „Amikoj povos interparoladi tra centmeilaj aerdistancoj kaj oni pretiĝos aparatojn kaj per tiuj eblos vidi la aĵojn kiel vivajn.“ (J. Mařík)

Dana karavano en Ĉeĥoslovakujo. Post sufiĉe longa preparo interkorespondado fime efektiviĝis la plano, kiun unu al la alia reciproke — S. K. Nielsen kaj la aŭtoro de la raporto — promesis pasintjare en Danujo, kaj komence de julio aŭtobusa karavano de 31 danaj gesamideanoj atingis ĉeĥoslovakian ŝtatlimon apud Cheb. Anstataŭ lacigaj limkontroloj atendis la danajn gastojn pli agrablaj surprizoj. Gesamideanoj el Cheb kaj Praha bonvenigis ilin ĉe la limo kaj knabimeto en nacia kostumo vestita transdonis al la gvidanto florbukedon invitante ĉiujn al bonvena danco en lima gastejo. Noktomeze forveturo al Karlovy Vary, kie unua mallonga ripozo post longa kaj elĉerpiga vico da centkilometroj. Membroj de la klubo en K. Vary bone zorgis, ke ĉiuj vidindaĵoj lokaj kaj en ĉirkaŭaĵo estu vizititaj. Tra agrabla montarregiono portas la komforta Fordaŭtobuso la partoprenantojn. Precize laŭ la fiksita tempo alveno en Lány, kies vizito restas neforgesebla. Sufiĉe multaj gesamideanoj el Kladno kaj el tuta vasta regiono atendis jam la alvenon. Dimanĉo kolektis centojn da homoj ĉe la tombo de TGM, lia amata edzino kaj la populara filo. Vizito de la kastelo signifas rememori la lokojn, kie vivis kaj mortis la plej granda demokrato de la mondo. Karlštejn, la juvelo de ĉeĥoslovakaj kasteloj, kaŭzis unuhoran malfruigon por alveno en

Praha. Tamen vere impona nombro de samideanoj, kolektiĝintaj ĉe Malnovurba placo ekkrias siajn bonven-salutojn. Salutas la prezidanto de la Asocio kaj la prezidanto de la Klubo en Praha ankaŭ en la nomo de Sokolaro. Post la salutrespondo de la karavanestro granda florkrono estas metita al la tombo de Nekonata soldato. Plenplena Týn-preĝejo (Teyn) ĉeestas malgrandan ceremonion sur la tombo de la dana astronomo Tyge Brage. Sekvantan matenon la danaj gastoj akompanataj de siaj gastigantoj trarigardas la belajn de Praha. Posttagmezo estas dediĉita al la Sokola kongreso. Bonaj tribunaj sidlokoj lasas ĝui la gastojn tutan imponon kaj varion de la unuopaj prezentadoj. Vespera programo prizorgata de la klubo en Praha. Necesas substreki la historian priskribon de la neniigo de Lidice, kiun en perfekta lingvo rakontis estinta kamenpurigisto de la malfeliĉa vilaĝo. Kvankam estis forta matenpluvo, ĝi neniel povis malhelpi al ĉiuj por kolektiĝi surtribune kaj de tie alrigardi longajn horojn daŭrantan Sokolmarŝon. Bildoj neimageble belaj sekvas unu la alian kaj la karavano tre ofte salutata respondas komunvoĉe: „Dánsko zdraví ČSR, Dánsko zdraví Sokol“. Por la gesamideanoj en Hradec Králové, kiuj pacience atendis la alvenon de la karavano, restis nur konstato, ke granda parto de la danaro perdis siajn voĉojn. Ankaŭ la vizito de la rokaro en Prachov efektiviĝis dum brila posttagmezo. Du rokgrimpuloj montris sian specialan arton honore al la danaj gastoj. Vespera kunsido en Hradec Králové pasis en ĝeamika medio tre rapide kaj matene starto al Macocha kalkgrotaro, kiun ni atingis en la frua posttagmezo. Subterajn katedralojn sekvas ŝipremado en grota lumigita rivero, per kiu finas la posttagmeza fabelo. Kaj en Brno vespere samideanaro kolektita en klubo salonego prezentis varian programon, kiun la danoj regalis per siaj plaĉaj forkantoj. Třebíč atingita laŭplane montris siajn tipajn mondkonatajn betlehemojn krom la lokaj vidindaĵoj. Kaj Tábor preparis ege lukse aranĝitan vesperon, kie ansero kun farunbuloj kaj brasiko, aĝrablaj festparoladoj kaj muzika artoprogramo kaŭzis absolutan kontentecon de ĉiuj. Speciale agrabla estis la persona ĉeesto de la prezidanto de Loka Nacia Komitato. Antaŭtagmeza frarigardo de urbaj vidindaĵoj estis finita per la vizito de la domo de prezidento Dro E. Beneš en Sezimovo Ústí. Vespere estis atingita Plzeň, kie loka grandnombra samideanaro post komuna danstila vespermanĝo preparis vere tre varian amuzvesperon. Lasta nokto en Ĉeĥoslovakujo kaj matena akcepto en la urbodomo elĉerpas la programon de la karavano. Posttagmeza adiaŭo ĉe la limo dum la komuna trinkado de „lasta“ ĉeĥa biero nunjara eligas al multaj larmojn de emocio. Aŭtobuso iom post iom malaperas en la malproksimo malantaŭ la limbaroj... Restas nur kelkaj aldonaj vortoj: Dankegon al vi, ĉiuj ĉeĥaj gesamideanoj! Mi estis vere fiera je vi ĉiuj, ĉar vi modele montris, ke tio, kion mi rakontis en Dandlando pasintaŭtune, ne estis nuraj sekaj vortoj sed faktoj. Kaj vi, danoj niaj karaj, ne forgesu viajn promesojn pri via venontjara reveno, ĉar slovaka samideanaro volas montri al vi sian landon, pri kiu mi povis nur rakonti al vi! Do — Paa Gensyn i Tjeĥoslovakiet 1949! (jelĉ)

Tria Somera Esperanto-Lernejo en Doksy la 17-an — 31-an de julio kunvenigis 192 partoprenintojn. Tiu nombro en si mem signifas gravan sukceson, ĉar ĝi estas rimarkinda kresko kompare kun la du jaroj antaŭaj (86 kaj 114), kiuj mem ne estis malgrandaj. El la lernejanoj estis 113 viroj, 79 virinoj, ilia aĝo estis 10—67 jaroj, la plej granda nombro estis inter 20—30 jaroj. Laŭ profesio estis: oficistoj diversfakaj 46, studentoj 30, komercistoj kaj metiistoj 27, instruistoj 18, laboristoj 14, privatuloj 12, diversaj profesioj 8, fervojoficistoj 5, lernej-direktoroj 5, inĝenieroj 4, metio-lernantoj 3, juristoj 3, poŝtoficistoj 3, profesoroj 3, fervojinspektoroj 2, tipografoj 2, kuracistoj 2, oficiro 1, pastro 1, aktoro 1, verkistoj 2. Estis kvar kursoj kun sekvaj estroj kaj indikitaj nombroj de ricevitaĵaj konfirmoj pri studado: A. Elementa (Karel Šolc), 51. B1. Progresinta (prof. Josef Kožený), 33. B2. Progresinta (MUDr Frant. Vaněk), 32. C. Konversacia (Václav Špúr), 36. D. Seminario (PhDr Aug. Pitlik), 20. Krom la 5 nomitaj instruis regule ankorau Vlastimil Severa, Antonín Slanina, Josef Vitek. Ĉiuj instruintoj estas aprobataj instruistoj de Esperanto. La 30-an de julio prelegis unu horon por kursoj C kaj D Dr Stan. Kamarýt: Pri analiza kaj senpera metodo por instruado de lingvoj, Oratoran

kurson gvidis Ant. Slanina. Direktoro de la Lernejo estis Dr A. Pitlik, lektoro de Esperanto ĉe Alta Lernejo de Specialaj Sciencoj. La klasejoj estis en Burĝa lernejo, kies direkciu akceptu sinceran dankon pro disponigo de la domo. Loka Nacia Komitato akceptis protekton de la Lernejo kaj ĉiumaniere helpis al ĝiaj taskoj. Ankaŭ ĝi akceptu niajn dankojn plej varmajn. La instruado estis ĉiutage je la 8.30—12.30-a horo. La vizito de la lecionoj estis tre bona, neĉeesto de lerneano estis escepto. Multaj lernejanoj anoncis sin al ekzameno ĉe la Asocia Ekzamena Komisiono la 31-an de julio kaj ĉiuj sukcesis. La lernejo-kolizo estis reduktita al nulo ĉe 7 p., al duono ĉe 11 p. La partoprenantoj loĝis preskaŭ ĉiuj ĉe privatuloj.

Ankaŭ programo krom la lecionoj estis tre alloga, instrua kaj amuza.

Interkonatiĝa vespero okazis sabaton la 11-an de julio, kiam la plej granda parto de partoprenantoj estis kunveninta. Dimanĉon la 18-an la gastoj estis solene salutitaj en la urbodomo de ano de la Konsilantaro de la Loka Nacia Komitato s-ro Karel Dušátko, multjara esperantisto, ĉeĥe kaj esperante. Lia alparolo kaj respondo de direktoro de la Lernejo Dr A. Pitlik estis disaŭdigataj per la loka Disaŭdigo same kiel la poste sekvinta esperantista himno, dum kiu estis hisita Esperanto-flago, kiu flirtis dum la du semajnoj lerneja. Poste okazis en kinejo publika parolado de esperantista vojaĝanto s-ro J. Pech el Plzeň: „Nekvieta Palestino kaj Egipto“, kiu vekis grandan intereson ankaŭ ĉe ne-esperantista publiko. La posttagmezojn pasigis multaj ĉe la lago banante sin kaj partoprenante en akvosportoj. La vetero favoris tiun agadon nur dum la dua semajno. Vespere plenigadis dum la unua semajno teatraj prezentadoj de la III-a Mĉha-festivalo teatro-amatoraj; la prezentoj havis tre altan nivelon. Vetremado sur la Lago okazis la 22-an je la 15-a h. Venkis s-o Jestřáb (26.0 minutoj inter Doksy kaj Staré Splavy), sekvis Mecera, Šubrt, Mlejnek, Novák. Konkuren en persist-naĝado la saman tagon partoprenis Markizino, Fridrichová, Nývltová, Mirek; venkis Fridrichová-Nývltová. Dimanĉon la 25-an okazis ekskurso per tri aŭtobusoj (160 p.) al la Bohemia Paradizo (Ml. Bolešlav, Kost, Prachov-rokaro, Masaryk-irvojo, Hrubá Skála, Sedmihorky). Ĝi tre kontentigis ĉiujn. Solena vespero por honorigi 65-an naskiĝtagon de direktoro de la Lernejo dro. Pitlik okazis la 27-an je la 21-a horo en hotelo Jelen. Ĝi estis la plej altnivela el la aranĝoj. Kvarteto de MUDr Fr. Vaněk prezentis Mozart, Šubrt, Dvořák, Bach (unu el la verkoj estis ilustrita per danco de eminenta amatorino), direktoro Matějka kun sia filo prezentis bonegan violonludon, prof. Vifč solkanton, prof. Kožený deklamon majstran de modernaj ĉeĥaj poemoj. La programo ravis ĉiujn. La vizito de la skolta bivako en Staré Splavy la 28-an ne kontentigis la esperantistojn pro stranga konduto de la invitintoj. Venezia nokto sur la Lago la 29-an organizata de Ant. Slanina estis travivaĵo ravanta: lampionoj en boatoj, piroteknikaĵoj, muziko, kantoj, danco en la stranda restoracio. Ne mirinde, ke pluraĵ ne povis adiaŭi al revoj estintaj kaj estontaj. Inaŭguro de strato nomigita „Esperanto“ okazis la 30-an je la 18-a h. per solena kunveno, aranĝita de la urbestro. Kunvenis ĉiuj lernantoj de la Lernejo kaj loĝantoj de la urbo. Estis kantataj himnoj Ĉeĥoslovaka kaj Esperantista, poste prezidanto de la Loka Kleriga Konsilantaro Vl. Severa bonvenigis la ĉeestantojn kaj precipe la membrojn de la Ekzamena Komisiono ĵus venintajn. Poste prezidanto de la Loka Nacia Komitato s-ro Vachuška akcentis en sia alparolo valoron de Esperanto kaj tre informite li klarigis kial la nova nomo de la relative grava strato nomata ĝis nun „ĉirkaŭira“ estas „Strato Esperanto“ (ulice „Esperanto“). En nomo de la Asocio dankis al li kaj al la urbestro vicprezidanto de la Asocio Dr Kamarýt, akcentante, ke idealo de la helpa internacia lingvo respondas al la idealoj socialismaj. Poste la ĉeestantoj trairis la tutan straton, kaj ĉe la fina tabuleto diris siajn dankojn direktoro de la Lernejo Dr Pitlik kaj en nomo de la lernejanoj s-ro Jeřábek. Per kanto de la esperanta kanto la soleno estis fermita. — Kompreneble ekzistis multaj amuzaj entreprenoj kun programo improviza. El tiuj programoj estu precipe enskribitaj mario-netaj prezentadoj de Eldraketo kaj la improvizitaj kabaradoj, precipe mardon, la 20-an, kiam aktorin marionetoj, kantistoj ambaŭlingvaj, buŝharmoniko, sorĉado, fakiraĵoj, ekvilibristiko, ŝercoj, prezentataj precipe de Vondráček,



Studentoj de la Somera Esperanto-Lernejo en Doksy kun siaj instruantoj.



Jozefo Vitek instruas en Doksy, fervorege laŭ kutimo sia.

Vitek, Slanina, Nývlt, Toman, Eisenreich dum gvido de Vitek, inter kies multaj talentoj estas ankaŭ tiu de bonhumoro. Ne unufoje ni aŭdis rememorigi tiun tonon en lia komplika spirito, ĉar li dum la Lernejo ofte lasis ĝin soni. Aparte laŭdan mención meritas ankaŭ Kantista ĥoro samideana de prof. Drago Vitič.

Somera karnavalo la 30-an de julio post la 21-a horo en la tre belaj salonoj de la kastelo estis la lasta entrepreno amuza. Oni vidis fantaziajn maskojn, promenantajn tra la koridoroj kaj salonoj babilante, ŝercante, amindumante kaj dancante kun entuziasmo. Dum la meznokto aperis, kiel decas por antikva kastelo, la Blanka mastrino kun kandelo kaj malgraŭ siaj kelkcent jaroj parolanta Esperanton. Du kapeloj muzikis ĝis la 3-a horo matena.

Sabaton kunvenis ĉiuj lernejanoj kaj instruintoj en la Masaryk-parko por adiaŭi reciproke. Estis kortuŝa afero, kortuŝa sincere.

Dum la du semajnoj aperadis ĉiutage la ciklostilita Verda Voĉo de Doksy, redaktata de Slanina. Ĝi meritis apartan alineon. Estas ĝuo foliumi tiujn 12 kajerojn. Informoj, poemoj, versoj, spritaĵoj, sentencoj, ofte tre pripensindaj, svarmas sur tiuj paĝoj. Enestas ankaŭ bonega Lukáš-traduko de poemo „La malliberulo en Bezděz“. Samideano Slanina akceptu sinceran gratulon! El anekdotoj ni repressu la sekvantan:

Inter boduanoj instruisto demandas: „Ĉu vi povas, fraŭlino Manjo, diri, kiamaniere oni devas skribi la vorton Doksy? Ĉu Doksy aŭ doksi?“ — Respondas la studentino progresinta: „Se temas pri la fama verda urbo Doksy, nepre kun — y! Sed se temas pri neologismo „doksi“ temas pri verbo (býti v Doksech, doksati, být zamilován do Doks, být zamilován v Doksech, mknouti v Doksech, hladověti v Doksech) oni devas skribi — doksi.“ — „Bonege, fraŭlino! Ĉu vi povas konjugacii la verbon doksi?“ — „Ho jes, profesora moŝto: Mí doksis lastjare, mi doksas nun kaj mi doksos venontjare.“ —

Ni laŭdu inventemon de Verdakorulo kaj de ĉiuj ceteraj kunlaborantoj kaj ni finu la citaĵojn per versoj de Joĉo:

Epitafo kontraŭ Slanina:

Je komenca rigardo
kaptis min granda ardo,
sed estis nur unu kardo
kun efiko de ponardo:
Nome sinjoro Lardo!

Samideano Slanina pardonu, estas rimoj meritantaj esti konservitaj per preso.

Pri la fina rezulto de la Lernejo ni povas sole ripeti tion, kion ni diris antaŭ unu jaro. La Lernejo multon helpas al pli funda studo de la lingvo ĉe esperantistoj kaj same varbas novajn adeptojn de la lingvo. Por la ambaŭ taskoj tiom bone plenumataj meritas nia SELD-komitato

plej sincerajn dankojn kaj gratulojn. Estu salutita la instruistaro kun sia direktoro gaje kaj danke kaj al la studentoj estu dirita amika: Je revido! (Laŭ V. ŝpŭr.)

Ekzamenoj pri Esperanto ĉe Ekzamena Komisiono de Esperanto-Asocio en ĈSR okazis la 31-an de julio 1948 en Doksy en klasejoj de la burĝa lernejo. Prezentis sin por tiu kunsido al ekzameno unuagrada (pri scio de Esperanto) 17 viroj kaj 3 virinoj, al la duagrada (pri kapableco instrui E-on en lernejoj kaj kursoj) 14 viroj kaj 3 virinoj. El ili 4 ne sukcesis pri la hejma tasko, 3 ne povis veni al la ekzameno kaj sukcesaj notoj pri iliaj hejmaj taskoj validas por venonta kunsido.

Pri la scio ekzamenis ĉiuj ĉeestantaj komisionanoj po unu sub kontrolo de vicprezidanto J. Kožený. Pri kapableco ekzamenis kvar senatoj: a) Kamarýt, Pumpr, Vondroušek; b) Kamarýt, Pitlik, Bartošík; c) Kožený, Krajíc, Vondroušek; d) Hromada, Pumpr, Ginz.

Rezultato de la ekzamenoj estas la jena:

Diplomon pri lingva scio de Esperanto ricevis: Anna Ĉubová, Josef Drapák, Josef Eisenreich, Robert Halška, Krista Holečková, Zdeněk Janků, Ota Jerie, Jan Kožušník, Emil Kutík, Karel Mucha, Jiří Novotný, Miloš Nývlt, Marie Patzáková, Josef Roubínek, Václav Růžička, Vlastimil Severa, Petr Tichota, Karel Toman, Milan Vítovský, Stanislav Zimek, Miloslav Zvara.

Diplomon pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis (en krampoj estas temo de la hejma tasko):

František Bláha, faka instruisto en Zlín (Socialismaj idealoj).

Marie Borutová, faka instruistino en Kobyly na Moravě (Origina stato de la homa socio).

Ludmila Kavková, faka instruistino en Přerov (Vidaj belartoj en la Haná-regiono).

František Knotek, kalkul-sekretario ĉe la financ-direkcio en Tábor (Ĉeĥa pentro-arto).

JUC Ludmila Komzáková, juro-studentino en Tábor (Planado en societo socialista kaj kapitalista).

Bohuslav Novotný, fervojisto en Hlušovice (La socialaj rajtoj en la nova ĉeĥoslovaka kontitucio).

Jiří Páv, studento en Dolní Ples (El la historio de la telekomunikiloj).

Ing. Jan Schánělec, profesoro de komerca lernejo triagrada en Tábor (Novaj materialoj el artefaritaj rezinoj).

Ing. Emanuel Tuháček, inĝeniero terkulturista en Olomouc (Evoluo de la teknika kulturo en la lastaj ducent jaroj).

Josef Vašek, inspektoro fervojista en Olomouc (Esperanto kaj fervojoj).

Ĉe la unuagrada ekzamenoj estis donitaj notoj eminente 6, tre bone 9, bone 6. Ĉe la duagrada eminente kapabla 2, tre bone kapabla 5, bone kapabla 3.

Multaj el la ekzamenatoj ĵus finis kurson de la tiujara Somera E-Lernejo en Doksy. Precipe ĉe la unuagrada ekzameno estis iam surprize, kiom bone sciis kelkaj el ili la lingvon post tiu dusemajna studado intensa.

La ekzamenitoj akceptu nian gratulon pro sia sukceso kaj sinceran elkoran dankon pro sia sindediĉo al la lingvaj studoj.

Dua tutslovaka Esperanto-kongreso en Košice la 21-an ĝis 23-an de aŭgusto kunvenigis ĉirkaŭ 250 partoprenintojn el la tuta respubliko, venis ankaŭ multaj ĉeĥoj el Bohemio kaj Moravio. La aranĝantoj sukcesis krei efektive esperantistan atmosferon kaj kontentigi ĉiujn. Jam la nombro de la venintoj signifas sukceson, kiun niaj amikoj en Košice plene meritis. La versa alvoko sur paĝo 74 de Esperantisto Slovaka efikis kiel decas. La kongreso per si mem estis grava faro propaganda kaj organiza samtempe.

Artoprogramoj de la Verda Stacio estas regule prezentataj ĉiun unuan lundon de la monato je la 23,00—23,30 h. per stacioj Praha II, Morava, České Budějovice. La 5-an de julio estis la programo unuhora pri la Sokol-kongresoj sub titolo *Ĝis la plej alta celo* de Dr. Mařík. El la traduklingvaĵo de Dr. Pumpr ni akcentu la sonantajn kaj tamen naturajn rimojn. La lastaj 20 minutoj estis dediĉitaj al senpera raportado de Jar. Mařík el la dimanĉa Sokolprezentado; ĝi estis pro si mem eminenta faro kaj donis tre bonan bildon pri impresoj de rigardanto. — La 2-an de aŭgusto estis prezentita komedio de Zdeněk Jirotko: *Somera firmamento*. Ĝi volas sentigi, kiel la aspekto de la nokta ĉielo emocias ankaŭ simplulon, ke efiko de la alta ĉielo super ni ne estas sento artefarita

per konvencio sed natura sekvo de situacio. Aktoris Bobek, Höger, Piskáček, Švabíková, Mařík, reĝisoris Kožík, pianoludis Kubánek. En bona traduko de Pumpr la komedio nin forte impresis. Precipe komenca dialogo de Valenta sonis tre versimile, ne sonis voĉo aktora, sed voĉo homa.

Tábor, Ĉeĥoslovakio estas titolo de 10-paĝa faldprospekto, eldonita de Propaganda komisiono de la Loka nacia komitato. Ĝi enhavas multajn tre belajn ilustraĵojn pri la urbo kaj tre taŭgan tekston en bona Esperanto. Ĉiuj, kiuj kunlaboris pri tiu ĉi eldonaĵo, akceptu gratulon! La legantoj postulu po du ekzempleroj, unu por si, la duan por sia eksterlanda korespondanto laŭ adreso: Dr. Fr. Kroupa, direktoro de la muzeo en Tábor.

Dr-o A. Z. Hnízdo verkis ampleksan libron pri *Naturmemorindaĵoj kaj belajoj de Tábor*. La libro enhavas esperantlingvan resumon, tradukitan de Dr. Hugo Jokl. Eldonis ĝin Loka kaj Distrikta konsilantaroj klerigaj, kostas 75,— Kčs. La libro meritas esti legata de multaj, kaj la esperantlingva resumo ebligas ĝian klasiĝon al multaj fremdlingvanoj.

Vizitu la Altajn Tatroj estas faldebla prospekto 20-paĝa kun belaj bildoj el Tatroj-regiono. Ĝi invitis al la tutslovaka kongreso en Košice kaj rekomendas peti informojn pri la regiono kaj pri Svit-entreprenoj, kiujn donos Stefano Toth en Svit.

Slovaka Esperantista Societo kreis Ekzamenan komisionon, konsistantan el Ed. Vl. Tvarožek, Vl. Jukl, J. V. Dolinský, Pavol Rosa, A. Váňa.

LINGVO

Traduko de la 17-a teksto

Klement Gotvald okaze de¹ la Unua de Majo:² La februaraĵoj okazintaĵojn oni povas do kompari kun printempa ventego,³ kiu purigas atmosferon, forlavas malpurajn kaj post kiu la tuta naturo rapide ekfloras. Kaj estas historia fakto, dankeme rekonata de la tuta nacio, ke en tiu ĉi granda ekzameno staris frunte de la respubliko, frunte de tiu granda repuriga movado nia komunista partio kiel antaŭvidema,⁴ energia⁵ kaj prudenta gvidanto kaj ke ĝi tiel montriĝis kiel savinto de la respubliko kaj de ĝia trankvila evoluo. Pro tio la Unua de Majo estas por ni glora⁶ kaj ĝoja festotago de nova granda venko de la laboranta popolo, gvidata de la komunistoj, kaj samtempe ankaŭ festotago de nova entuziasma laboro ĉe (re)konstruado de nia patrujo.⁷ Sed⁸ la Unua de Majo estas ankaŭ granda revuo⁹ de sanaj demokrataj fortoj de nia nacio antaŭ la elektoj, en kiuj nia popolo libere denove diros sian juĝon pri la nuna vojo de la respubliko. Estas senduba¹⁰ — kaj certe konfirmos¹¹ tion ankaŭ la manifestacio de la Unua de Majo — ke ĝi denove¹² diros sian „jes“. Temas nun pri tio, ke tiu jes sonu plej laŭte,¹³ por ke ĝin aŭdu kun ĝojo¹⁴ ankaŭ niaj amikoj trans la landlimoj kaj por ke ĝi silentigu¹⁵ la kolerajn kontraŭincitadajn¹⁶ de niaj malamikoj. Temas pri tio,¹⁷ ke ĉi tiu „jes“ estu instigo¹⁸ por nova prospero de popolaj fortoj, ke ĝi plenigu nian popolon per krea¹⁹ optimismo kaj fortigu ĝin por plua persista kaj oferplena konstrua laboro.

Poznamky:

¹ též „por“; méně vhodné „al“; ² nikoli: „unua majo“. Jde o „unua (tago) de majo“. Pišeme velkými počátečními písmenami, jako vlastní jméno; ³ štormo, fulmotondro; ⁴ antaŭzorgema; ⁵ decidpreta; ⁶ nikoli „fama“ = slavný ve smyslu proslavený. Zde „slavný den“ je „den slávy“ (gloro), tedy „glora tago“. „Solena“ je „slavnostní“; ⁷ patrolando, hejmlando; ⁸ „sed“ musí být v esperantu na začátku věty; ⁹ revuo = solena parada inspektado; ¹⁰ sendube, sendiskuta, sendiskute. Estas sendiskuta (afero), ke... ¹¹ nikoli „asertos“ = bude tvrditi. „Aserti“ = tvrditi, certigi, pretendi, ke io estas vera (Plena Vortaro); ¹² refoje; ¹³ nikoli: des pli laŭte = tím hlasitěji; ¹⁴ ĝoje

aŭdu; ¹⁵ stačí místo: kri-timigi, krisilentigi. Též „mutigi“; ¹⁶ provokoj. Nikoli zde: „kurĉaso, parforsa ĉaso“; ¹⁷ zde též: gravas, ke...; ¹⁸ impulso; ¹⁹ tvůrčí = krea. Kreanta = tvořící.

Došlo celkem 24 překladů, tedy dosud největší počet. Práce zaslali: Jindřich Černý, Praha; Ant. Hladík, Kostelec n. L.; Jos. Eliáš, Kunderatic; Zdeněk Hřel, Hradec Králové; Lud. Kavková, Přerov; Frant. Kuba, Olomouc; Jos. Košutek, Mor. Nová Ves; Jan Kožušník, Kunčice n. Ostr.; Kryštof Kunz, Opava; Alfred Macek, Pulgáry; Eug. Matirko, Košice; Dr. Rud. Pawlik, Ostrava; Erna Rudolfová, Trutnov; Václav Růžička, Podmokly; O. Skleněčka, Teplice; Jos. Sobíšek, Hradec Králové; Fr. Šimánek, Debr; Jaromír Štechr, Pardubice; Marie Šusterová, Hranice; Stan. Valníček, Nivnice; A. Vavrušová, Praha; K. Vít, Zlín; M. Wadasová, Olomouc; Jan Zdvihal, Týnec n. Sáz. — Knižní odměnu zasíláme p. Janu Zdvihalovi. Hm

18. úkol k překladu

Končí se strašná válka, v níž byl učiněn pokus rozvrátit a rozbít náš stát, oddělit Čechy od Slováků a zničit náš národní život. Tento ničemný atentát se nezdařil. Vyjdeme z této války zase vítězní, sjednocení a svobodní. Musíme se však učit z chyb a nedostatků minulosti stejně jako ze svých nových úspěchů a vítězství. Náš nový dům musí být politicky a sociálně přebudován, s novou náplní, s novými lidmi a mnohdy i s novými institucemi. Mějte víru v tento nový život a mějte všichni odvahu se k němu mužně, bez strachu a poctivě probjovat!

První cesta k tomu je, abyste v těchto chvílích převratu a velkých změn nepadli v nepořádek a chaos, nezačali se svárit mezi sebou stranicky a nedostali se tak tam, kam se už dnes dostali někteří jiní národové. V rozhodných chvílích musíte mít odvahu začít budovat svůj stát oddvěně a poctivě, neosobně a nestranicky podle nových potřeb, které vyvolala druhá válka světová.

(Dr. Edvard Beneš v posledním projevu z Londýna 16. února 1945.)

Překlady raĉte zaslati do 10. října 1948.

SCIIGOJ

Ministroj-esperantistoj. Samideano W. Drees, kun kiu korespondis nia Lerneja Komisiono, dum li estis nederlanda ministro de instruado, fariĝis nederlanda ĉefministro. S-ano Istvan Kossa, pri kies akcepto de Danubvala-konferencanoj vi legas en tiu ĝi numero, fariĝis hungara ministro de industrio. Samideanino Larssen, vizitinta antaŭ kelkaj semajnoj Esperantistan Klubon en Praha, fariĝis ministro en la nova finnlanda registaro. Ĉiuj tri ministroj estu salutitaj de ni respektate kaj sincere kaj akceptu deziron, ke iliaj malfacilaj taskoj sukcesu por bono de la homaro.

Budapeŝta konferenco. La Konferenco de la Danublandaj esperantistoj, kunvokita por la 22-a ĝis 25-a de julio al Budapeŝto, estis certe signifoplena okazintaĵo. Ĝi certe influos la Esperanto-movadon en la koncernaj landoj kaj por la partoprenintoj estos agrable ĝin rememori. La hungaraj samideanoj montriĝis lertaj aranĝantoj kaj plej afablaj gastigantoj.

Estis interese revidi la belan Budapeŝton, kvankam premis la koron rigardo al la multegaj ruinoj, kiuj estis iam kuraĝaj pontoj kaj pompaj palacoj. Pli interese ankoraŭ estis vidi denove post longega tempo niajn malnovajn amikojn, kiuj multon travivis dum la bruaj jaroj, sed kiuj en sano aperis nun antaŭ ni. Jen kolonoj de nia literaturo: la granda duopo Kalocsay kaj Baghy, jen Tárkony-Totsche, Halka, jen Somlai-Spierer, kiuj konatigis nin per siaj sukcesaj tradukoj kun eminentaj verkistoj hungaraj. Kaj ni parolas kun la ĉiam viglega Balkányi kaj kun Kőkeny, al kies rilatoj ŝuldas la Konferenco multon de sia sukceso. Ĉiuj junaj spirite kaj korpe. Enviinda Budapeŝto! Kaj malantaŭ ĉio Berceli-Bleier, la ofte nerimarkebla, sed ĉion movanta spirito de la Konferenco.

La bela hungara parlamento disponiĝis al ni sian grandan halon, brilantan en oro kaj koloroj. La konferencanoj ĉiam komplete pleniĝis la grandan ejon. Plejparto el ili estis kompreneble hungaroj, sed venis multaj aŭstroj kaj bulgaroj kaj kelkaj jugoslavo. Ne sukcesis ricevi ĝustatempe enirpermeson rumanaj kaj la polaj esperantistoj, anoncintaj sin al kunlaboro. Estis reprezentita nia Asocio, da ĉeĥoslovakaj samideanoj estis sume naŭ, el ili ses el Slovakio.

Oni aŭskultis kun atento la raportojn, prezentitajn de la landaj delegitoj, pri la stato de la movado, pri laboroj faritaj kaj entreprenataj, pri laborometodoj sukcesintaj kaj pri provoj, kiuj montriĝis ne sukcesaj. Ŝajnas, ke tiu interŝanĝo de sperto povas alporti utilon. Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko konsideras tial plej serioze la inviton, esprimitan de la Konferenco, ke ĝi aliĝu al la Danublanda Esperanto-Komitato kaj ke ĝi tiel havu eblecon daŭre uzi la spertojn de tiuj najbarlandaj organizoj esperantistaj. Ili ĉiuj komune volas fariĝi forta apogo de la tutmonda Esperanto-movado.

Estis ĝuo interparoli kun la delegitoj bulgaraj, Asen Grigorov, estinta sekretario de la ŝtatestro Georgi Dimitrov kaj kun la grandstatura Aleksejev, ĝen. sekretario de la bulgara sindikata movado, ĉiuj estis ravitaj per ĉarmo kaj elokvenco de samideanino Nada Gropuzo, delegito de la Jugoslava Esperanto-Federacio, kaj ĉiuj streĉe aŭskultis la alian jugoslavan reprezentanton, la kleran Božidar Vančik. Sed plej klare trasonis la halon voĉo de aŭstria delegito Wokal.

La Konferenco fiksas nete la vidpunkton de la partoprenintaj landoj al UEA, por kies energia subteno ĝi sin deklaris. Same klare ĝi esprimis sin kontraŭ SAT.

El traktado pri Literatura Mondo esperis la kunlaborantoj tiri ian profiton. Tiu espero neniel plenumiĝis kaj montriĝis sole, ke literaturaj kaj lingvaj problemoj ne estas taŭga temo por publika pritrakto.

La oficialuloj hungaraj kaj la publiko dediĉis al la Konferenco multe da atento. Ĉiutage aperis pri ĝi raportoj en la gazetoj kaj la eksterlandajn delegaciojn akceptis la gvidantoj de la politika vivo hungara. La akcepto estis ĉie sincera kaj amika. La ĉefministro Dinnyes en longa interparolo esprimis siajn simpatiojn al Esperanto kaj parolis pri la malfacilaĵoj, kiujn kaŭzas al internaciaj renkontoj la multlingveco, longe nin gastigis ankaŭ la laborista gvidanto Rákosi, anstataŭanto de la ĉefministro, unu el la elstaraj personoj de la lando. Li ne bezonis inter-

pretiston, mem komprenante Esperanton. Ministro de milito Veres, estro de Hungara Kamparana Partio, diskutis kun ni interese kaj respondis kompetente ĉiujn antaŭmetitajn demandojn, same Kossa, ĉefsekretario de la sindikata centro, nun ministro de la industrio. Kossa dediĉis al ni plenan horon eble, parolante kun ni ĉiuj en Esperanto. La delegitoj estis akceptitaj ankaŭ de la Hungara Agrara Partio kaj en la ministerio por instruado. Ili parolis ankaŭ el la Budapeŝta radiostacio. La vizitoj estis fotografitaj kaj filmitaj.

La hungaraj esperantistoj kaj ni kun ili esperas, ke tiuj afablaj akceptoj ne estis nuraj aktoj de ĝentileco, sed ke ili havos favorajn sekvojn por la Esperanto-movado hungara.

Se ni aldonos, ke la eksterlandaj partoprenantoj estis ĉiamaniere dorlotataj gastoj de la hungaraj samideanoj, komplete pri ili zorgantaj, ni komprenos, ke ilia disiĝo de Budapeŝto ne estis por ili facila.

Kaj se ni akceptos la taskon inviti la venontjaran Konferencon al nia lando, ni devos ege klopodi, por nur iomete egali la aranĝintajn hungarojn. O. G.

Samideanino Nada Gropuzo estis intervjuata de J. Mařík pri la Konferenco en la Radio-Praha la 16-an de aŭgusto. Ŝia voĉo konfirmis la simpatiojn, akiritajn de ŝi en Budapeŝto.

Koncesio. Post preskaŭ trijara intervenado fine ni sukcesis ricevi nian librovendistan koncesion. Ni estas nun ŝtate koncesiita librovendejo kaj eldonejo kaj ni faros ĉion por plenumi la taskon, kiun ni metis antaŭ nin: Servi la ĉeĥoslovakajn esperantistaron per bona esperanta literaturo. Ĉefe mankas restarigo de niaj internaciaj rilatoj kaj certe scias niaj amikoj, ke plenumo de tiu kondiĉo ne dependas de ni.

Glumarkoj Dittrich. Nia membro Jarka Dittrich eldonis glumarkojn kun taŭgaj varbaj tekstoj ĉeĥlingvaj. Folio kun 20 diversaj glumarkoj kostas 1 Kĉs. Ni liveras minimume 10 foliojn por 10 Kĉs afrankite.

Kilian-lernolibro, VI-a eldono (20—25 mil), ĵus aperis kaj estas denove ricevebla po 39 Kĉs plus afranko 2,50 Kĉs.

Malgranda vortaro esperanta-slovaka kaj slovaka-esperanta, Kompilis J. V. Dolinský. 1948. Eldonis Slovaka Esperanto-Instituto en Turĉ. Sv. Martin. 212 paĝoj. Por 60 Kĉs plus afranko 2,50 Kĉs tuj liverbla de nia Librovendejo.

Adreso de la Asocio. — Ni petas, ke ĉiujn korespondantojn oni adresu al Esperanto Asocio, poŝt. ŝkránka 75, Praha XIX/14.

Donacoj al EAĈSR. Por subteno de la Asocia agado alvenis ĝis 30-a de junio (Psp. 9602) la jenaj donacoj: F. Blaha, Zlín, Kĉs 257,20; J. Hiža, Praha, Kĉs 100.—; A. Kabová, Praha, Kĉs 200.—; M. Němec, Brno, Kĉs 200.—; J. Rind, Batňovice, Kĉs 100.—; J. Smejkal, Třešť, Kĉs 200.—; T. Suchánek, Praha, Kĉs 500.—. Krome alvenis multegaj malgrandaj sumoj sub 100 Kĉs. La donacintoj akceptu sinceran dankon pro la kompreno.

Korekto de preseraro. Sur paĝo 71 okazis dum surpaĝigo de la poemo katastrofa perturbo en sinsekvo de strofoj. Por ricevi la bonan sinsekvon bonvolu numeri la strofojn horizontale 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8. Poste notu, ke la strofoj devas sekvi jene: 1, 3, 5, 7, 2, 4, 6, 8! — Ne koleru tro al nil



Aeronaŭtika terminaro od E. D. Durranta, které vyšlo 1941 v Londýně, bylo přeloženo do češtiny ing. L. Krajcem v Táboře. Za účelem zveřejnění překladu žádá p. ing. Krajc, aby se mu laskavě přihlásili ke spolupráci ti z našich členů, kteří jsou odborníci v názvosloví leteckém. Slovníček má toto rozdělení: Aeronautika generála, Manovroj, Aerodinamiko, Fluidmovoj, Flugkapabloj, Aerodinoj, Formo kaj aranĝo de surfacoj, Strukturo, Instrumentoj, Navigado, Paraŝutoj, Motoroj, Raĉte se přihlásiti přímo p. ing. L. Krajcovi, České Budějovice, Žižkova 42.

El la redakcio. Ĉar la ministerio de informoj malgrandiĝis nian kvoton de papero — same kiel al ĉiuj ceteraj gazetoj — ni ne almetas la vortaran aldonon. La restantaj paĝoj de la vortaro estas kompostataj kaj la abonintoj ricevos ilin per unu fojo.

ESPERANTO V CIZINĚ

Belgický rozhlas se tázal před časem svých posluchačů, co soudí o otázce mezinárodního jazyka. Pro používání mezinárodního jazyka se vyslovilo 87,50 proc. posluchačů, proti 12,50 proc. Ze zmíněných kladných odpovědí je 51,25 proc. posluchačů pro esperanto, 6,87 proc. pro angličtinu, 1,25 proc. pro latinu a 0,62 proc. pro francouzštinu. 27,50 proc. posluchačů prohlásilo, že je jim lhostejno, který jazyk bude zaveden, jen aby k tomu konečně došlo. Je velmi pozoruhodný poměr hlasů mezi vychvalovanou angličtinou a haněným esperantem a je zřejmo, že pracující lid je si velmi dobře vědom výhod, které by mu přinesl mezinárodní jazyk takové jednoduchosti, jako je esperanto. (Čs. demokracie 7. III. 1948.)

Dánsko. — Letní kursy esperanta na mezinárodní lidové universitě v Helsingoru konaly se v době od 17. do 31. července 1948, těsně před mezinárodním kongresem esperanta v Malmö. — V Aarhusu bylo uspořádáno v poslední zimní sezóně celkem 17 veřejných kursů esperanta. (K. i.)

Guatemala. Delegito Universala Esperanto Asocio Jules Bonge (Poste restante Guatemala Cd.) dostal povolení zřídit v zemi mezinárodní osadu přistěhovalců z esperantistů. Vláda slíbila imigrantům veškerou podporu k založení nových výrobních odvětví.

Maďarsko. — Mezi členy maďarského parlamentu je mnoho přívrženců mezinárodní pomocné řeči esperanta, kteří se sdružili v parlamentní skupinu. Ve dvoraně parlamentu je stálá výstavka esperantských knih, různých publikací a dokumentů o rozšíření esperanta ve světě. — Starosta Budapešti dal podnět k dalším dvěma kursům esperanta pro tamní učitele a pedagogické odborníky. Kursy vedou L. Kökeny a slavný esperantský spisovatel Julío Baghy. (K. i.)

Rakousko. — Mezinárodní esperantské muzeum ve Vídni, které šťastně přečkalo válku i bombardování Vídne, bylo znovu otevřeno veřejnosti. Jeho bohaté sbírky jsou umístěny ve čtyřech síních bývalého císařského zámku Vídeň 1, Hofburg, Batthyanystrasse, 3. Stock. (K. i.)

Uruguay. — Sjezd uruguayských učitelů odhlasoval resoluci, v níž vyjádřil přání, aby esperanto bylo zavedeno do škol. (K. i.)

Petici Spojeným národům pro esperanto podepsal v poslední době polský předseda vlády Józef Cyrankiewicz.

Z francouzského románu: Dole u schodů hovořili živě tři muži jazykem, který nebyl ani španělština ani italština. Byli to tři přesvědčení esperantisté. Jeden z nich, Charpentier, profesor v Lausanne, který přijel toho dne, aby vyslechl přednášku Janottovu, řídil revui, dosti rozšířenou v revolučních kruzích, Lemanský es-

perantista, nezmeškal ani jediné příležitosti, aby netvrdil, že jednou z prvních potřeb mezinárodního světa je světová řeč; že přijetí esperanta, společně pomůcky všech národních jazyků, usnadní duševní i hmotnou výměnu mezi lidmi; rád se opíral o vznešenou autoritu Descarteso-
sovu, který pronesl v jednom soukromém dopise velmi přesně přání po »světové řeči, které by bylo lze velmi snadno se naučit, kterou by bylo lze snadno vyslovovat a psát, a což je hlavní, která by pomohla úsudkům...« (Roger Martin du Gard: Rodina Thibaultů sedmá část, str. 43.)

Světový kongres esperantistů (třicátý třetí) v Malmö od 31. 7. do 7. 8. t. r. měl 1750 účastníků z 33 zemí. Denně byly na krátkých vlnách vysílány esperantské zprávy o jeho průběhu. Pražský rozhlas vysílal 2. srpna podle odbošlouchaných relací zprávu o jeho zahájení. Za československé esperantisty pozdravil sjezd Pavel Rosa z Bratislavy. Sjezd měl na programu obšírnou diskusi o mezinárodní organizaci propagandy a učinil řadu důležitých usnesení. Proto budeme o nich referovati v esperantské části našeho listu až po uveřejnění zápisu o schůzích. Orgán skandinávských dělnických esperantistů přinesl úvahu, že jediné socialistická Evropa může zaručiti oficiální zavedení esperanta.

Téměř současně konal se v Amsterdamu sjezd Beznárodního svazu všesvětového (Senacieca Asocio Tutmonda), který zastupuje snahy, aby esperanto se stalo ne pouze pomocným, ale jediným jazykem světa. Také tam se sešlo přes 1300 účastníků. Též o amsterodamském sjezdu pojednáme v esperantské části podrobněji.

Brazilský ústav pro geografii a statistiku vydal právě Statistický přehled Brazílie 1946 s texty portugalským, anglickým a esperantským: Sinopse Estatística do Brasil, Statistical Abstract of Brazil, Statistika Resumo pri Brazilo. Rio de Janeiro. Servico Gráfico do Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística. 268 stran, 19×27 cm. Statistický úřad brazilský pracuje rychle, jsou tam data z roku 1945. O použití esperanta praví v předmluvě předseda statistického úřadu Heitor Bracet: »Jiná novota, uvedená do tohoto druhého čísla Přehledu, je použití esperanta vedle portugalského a anglického. Tím je uskutečněn návrh, schválený usnesením Národní statistické rady, aby neutrální jazyk byl přijat za pomocný pro brazilskou statistiku, a bylo vyhověno přání, jež předložil našemu ústavu Desátý sjezd brazilských esperantistů v Rio de Janeiro v dubnu 1945.« Příručka je velmi podrobná a listování v ní velmi poučné.

La Nova Kristanismo, bazita sur la doktrino de sveda sciencisto kaj reformatoro Em. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri la vera religio, bazita sur la Biblio kaj ĝia interna senco. Informas: Jan B. Vlach, Lužická 21, Praha XII.